

Pri la esperanta Vikipedio

Kial mi mencias kaj citas tiel ofte la esperantan Vikipedion?

Unue:

Ne ekzistas enciklopedio (en formo de libro) en Esperanto. En 1934 estis publikigita unu,

sed kiu posedas tiun enciklopedion? Ĝi ampleksas nur 2.500 artikolojn, kaj evidente ĝi ne pritraktas la scion, kion la homaro ekhavis post 1934.

(Kp. https://eo.wikipedia.org/wiki/Enciklopedio_de_Esperanto)

Due:

Eĉ en aliaj lingvoj multegaj homoj konsultas la Vikipedion.

Trie:

Mi volas atentigi pri la ekzisto de la E-Vikipedio kaj de ĝiaj multegaj artikoloj.

Kvare:

Kiam mi volas skribi pri iu temo kaj jam ekzistas artikolo pri ĝi (aŭ pri aferoj ligitaj al tiu temo) en la E-Vikipedio, mi ne povas ignori ĝin. (Kaj, citante ĝin, mi evidente devas mencii ĝin.)

Krom ĉio tio mi admiras la E-Vikipedion, aŭ pli ekzakte la aŭtorojn de la artikoloj. Kiuj estas tiuj kontribuantoj, kiuj laboras por Esperanto neprofiteme, altruisme? Eĉ ne aperas iliaj nomoj en la artikoloj.

Kiom da esperantistoj estas en la mondo? – 2 milionoj? Kiom da ili scipovas redakti artikolojn? Inter tiuj kompare malmultaj, kiom havas tempon kaj la specifajn konojn por skribi tekstojn por la enciklopedio?

Malgraŭ la malgranda nombro de tiaj esperantistoj jam ekzistas (nun, en julio de 2016) pli ol 225.000 artikoloj!!! (Veras, ke kelkaj estas tre mallongaj, sed aliaj estas tre longaj kaj detalaj.)

Post tiu “enkonduko” mi citos la E-Vikipedion ... pri la propra E-Vikipedio.

Unue kelkaj kialoj de ĝia graveco por Esperantujo:

- *Ĝi estas jam nun bone uzebla kiel ĝenerala enciklopedio - la unua en Esperanto.*
- *Ĝi informas ankaŭ pri Esperanto-temoj.*
- *Ĝi helpas ellabori la fakan lingvon.*
- *Ĝi ofte montras al alilingvaj vikipediistoj, ke koncerna artikolo ekzistas ankaŭ en Esperanto - ja Esperanto troviĝas oportune tuj post "English" en la listo "aliaj lingvoj".*

(https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Bonvenon_al_Vikipedio)

Poste la respondeculoj, dirante “*Se vi volas helpi diskonigi la vikipedion kaj varbi novajn kunlaborantojn*”, donas kelkajn ideojn (ripetante kelkajn el la supre menciitaj kialoj) :

Argumentoj kial subteni Vikipedion:

- *Vikipedio estas la unua vera enciklopedio en Esperanto, pri Esperanto kaj pri ĉiuj aliaj temoj.*
- *Vikipedio kontribuas al la necesa faka lingvaĵo en Esperanto.*
- *Vikipedio kunlaborigas esperantistojn por senchava celo.*
- *Per la esperantlingva Vikipedio, neesperantistoj ekscias pri Esperanto.*

(https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Vikipedio_kaj_Esperanto):

La respondeculoj ankaŭ donas ideojn pri tio, kie kaj kiel oni povas varbi por la E-Vikipedio:

- *Loka grupo: eblas elpensi interesajn grupvesperajn temojn kaj agadojn pere de Vikipedio [...].*
- *Renkontiĝoj: Dum renkontiĝoj eblas aranĝi diversajn kontribuojn:*
 - *prelego, ĉu ĝenerala aŭ faka*
 - *kurso, por instrui bazajn farojn*

(https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Vikipedio_kaj_Esperanto):

Aliaj eblecoj profiti de la E-Vikipedio en esperantaj grupoj (EG):

EG povas komune traduki, ankaŭ kiel lingva ekzerco, artikolojn de alia vikipedia lingvo al la esperantlingva. Ekzemple la EG en germana urbo povas traduki la germanlingvan Vikipedio-artikolon pri tiu urbo al Esperanto kaj meti ĝin en la esperantlingvan Vikipedion.

Ekzistas multaj alternativoj: Eventuale en via nacia lingvo, Vikipedio ankoraŭ ne havas bonajn artikolojn pri Esperanto, historio de Esperanto ktp. Vi povas traduki el la esperantlingva aŭ el alia nacilingva lingvo al la lingvo de Vikipedio.

(https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Vikipedio_en_EG)

Ĉu vi interesiĝas pri kontribui al la E-Vikipedio? Vidu kelkajn regulojn:

Kiu rajtas kontribui? Ĉiu, kondiĉe, ke li aŭ ŝi respektas niajn regulojn. La plej gravaj reguloj estas:

- *Vikipedio estas enciklopedio, ne forumo por babilado, politika propagandejo, blogo por personaj spertoj ktp.*
- *Konduku al aliaj vikipediistoj kun respekto.*
- *Respektu la kopirajtajn leĝojn, ne simple prenu tekstojn de aliloke. (Do reformulu la frazojn por eviti problemojn.)*

(https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Bonvenon_al_Vikipedio)

Bone, mi varbas por la E-Vikipedio, sed mi (ankaŭ) ne estas kunlaboranto. Kial? Oni bezonas ne nur tempon, sed ankaŭ konojn pri temoj, kiuj ankoraŭ ne estis pritraktitaj. Cetere – por kiu havas tempon kaj konojn – ankaŭ eblas korekti aŭ plibonigi kaj pligrandigi la ekzistantajn artikolojn. Pensu pri tio.